



2-A RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ
EN TURČIANSKE TEPLICE

okazis la 25-26an de majo ĉi-jara en Ripozdomo de la Maŝinuzino de Turiec. Partoprenis ĝin 45 ges-anoj el 12 lokoj kaj kelkaj gastoj el Moravio, frunte kun Jihlavanoj. La kunvenon, kiun partoprenis ankaŭ neesperantista publiko, gvidis s-ano A. Cambál.

La ĉefa ero de la sabat-vespera programo estis slovak-lingva prelego de Aug. Matovčík pri "100 jaroj de Matica slovenská". Parto de la prelego estis tralegita ankaŭ en Esperanto. - Poste ges-anoj Krajčíková, Nautová kaj Špigúth prezentis deklamantaĵojn el la poeziaĵoj de slovakaj poetoj-klasikuloj rilatantaj al la jubileanta Matica slovenská. El la neesperantista publiko aprezis la programon la 79-jara Teplicano k-do Bukovský kaj el inter la esp-istoj s-ano Hošek el Gottwaldov.

Dimanĉe s-ano Cambál raportis pri la agado de la E-rondeto en Martin. Post la saluto kaj raporto de la delegito de Ĉeĥoslovaka E-komitato parolis k-dino Ottilia Jurkovičová, reprezentantino de la Kleriga Instituto en Bratislava; interalie ŝi anoncis, ke la 12-13an de junio okazos en Ružomberok kunveno de la direktoroj de la slovakaj klerigaj institucioj, dum kiu ŝi parolos pri tio, kia devus esti ilia rilato al la E-rondetoj.

La kunveno estis plensukcesa, dank' al e-ano Ĥupka, kiu ĝin zorge organizis.

ESPERANTO AGADO

DE ESPERANTISTOJ EN

MARTIN KAJ JIHLAVA

METODOLOGIA HELPILO VII-VIII 1963

En julio okazis en urbo Jihlava jam la 14-a Filmfestivalo de la laboruloj. Sur la bildo vi vidas ekranon en Parko de Kulturo kaj Ripozo, kie la filmfestivaloj estas aranĝataj. La ekrano estas unu el la plej grandaj en Meza Eŭropo. La spektaklojn en natura amfiteatro povas viziti ĝis 12,000 homoj. Ankaŭ ĉi jare la festivalo ĝuis grandan intereson de jihlavanoj, ĉar estis prezentitaj elstaraj filmoj ne nur el Ĉeĥoslovakio, sed ankaŭ de eksterlando.

← /Fotis D-ro F. Kubica/

NACIA ARTISTO MARTIN BENKA KAJ ESPERANTO

Nia amiko Jaroslav Šustr en Praha, al kiu ni sendis la 1-an n-ron de nia Esperanto-Agado, gratulis al ni, sed samtempe ankaŭ riproĉis, ke sur la desegnaĵo de Majstro Benka ni forgesis menci, ke li estas esperantisto. J.S. skribas: "Ĉiu klera homo en Ĉeĥoslovakio scias, ke li estas nacia artisto, sed kiu scias, ke li apartenas ankaŭ al nia esperantista familio? Eĉ la plej multaj esperantistoj nekonscias pri tio. Citante la nomon de tia artisto skribu es-tonte: nia membro nacia artisto M.B., au: membro de E-rondeto en Martin. La atentigo estas sincera kaj serioza - ne refutu ĝin."

Akademia pentristo kaj nacia artisto Martin Benka estas ne nur esperantisto kaj nia favoranto, sed - kiel Esperanta verkisto - ankaŭ nia regula kunlaboranto. Jen la listo de liaj ĝisnunaj kontribuajoj:

Stranga koncerto (Esperantisto Slovaka 1948 pĝ 160). - Artpentristoj, ni vokas vin! (ES.1949 pĝ 52). - Nia stelo. Pri la ĝusta desegnado kaj presado de la verda stelo (pĝ 113). - Slovaka pentroarto (E.S. 1950 pĝj 50, 77, 87, 128, 151 kaj E.S. 1951 pĝ 7). - La gravurita bastono. (Esperanto en Slovakio 1958 pĝ 18 - transprenita el "Norda Prismo" en Svedujo). - Kion signalizis laĵka el la dua satelito? (E. en S. 1958 pĝ 25). - Por niaj infanoj: El la lernejo. La prudenta mensogulo. Nekontentiga aĉetaĵo. Scivolemo. Prudento. (E. en S. 1958 pĝj 65-66). - Mal-amikoj. Lau la leĝo de la naturo. (E. en S. 1958 pĝj 76-77). - La naturamiko. (Esperanto Martin 1960 pĝ 5). - Du gekunuloj. (EM pĝ 46). - Strigo kaj kokino. (E.M. 1961 pĝ 21 - 22). - Scivolo kaj envio. (E.M. pĝj 28-29).

Pri Martin Benka informas jenaj artikoloj: Majstro Martin Benka 60-jara (Esperantisto Slovaka 1948 pĝ 160). - Ombro al Martin Benka. (Esp. en Slovakio 1958 pĝ 76). - Martin Benka en Martin. (E.M. 1960 pĝ 5). - Intervjuo kun nacia artisto Martin Benka (E.M. 1960 pĝ 35).

Bildserieton de M. Benka aperigis Revuo Esperanto kun artikolo de J. Kuzmík. - Eliz

Iom pri la "abelregina ĵeleo" kaj ĝiaj efikoj.

La abelregina ĵeleo (materŝka ; materinska kaŝiĉka), estas jam regule aplikata en la kuracado. Ĝi estas ekskreciaĵo (eligaĵo) de faringaj glandoj de 8-12- tagaj abeloj. Laŭ ĝenia strukturo ĝi estas 10-hidroksida-delta-deceina acido. Ĝi entenas plurajn vitaminojn kaj aliajn plifortigajn kaj refreŝigajn elementojn. Gravas ilia plej konvena kombino, kiun la sciencistoj ankoraŭ ne sukcesis atingi.

Ĝi estas uzata dum unu jaro en kelkaj kuracadcikloj (periodoj). La taga kvanton kaj la daŭron de kuracadperiodoj kun interpaŭzoj fiksis la fakkuracisto (ekz. 50 miligramoj da ĵeleo ĉiutage dum 20 tagoj, do entute 1900 mg, au 2 gramoj dum 40 tagoj kun posta 2-monata paŭzo k.s.).

Ĝi efikas ĉe astmo bronĥa, kaŭzita de bakterioj - la atakoj ĉesas, sed ĝi ne efikas ĉe astmo kaŭzita de diversaj vegetaĵpolenoj (rostlinný pyl; rastlinný pel). - Ĉe arteriosklerozo kun malalta sangopremo ĝia efiko estas 100%-a, sed ĉe tiu kun alta sangopremo ĝi efikas nur en 40%-oj da kazoj, tamen subjektive la paŭzoj sentas sin pli bone. Post 3-4 kuracadperiodoj ankaŭ ĉe ili montriĝas certe tendenco al pliboniĝo de la malsano. - Post apopleksio (sangelfluo en la cerbon) la movebleco kaj funkcioj pliboniĝas pli frue ol sen kuracado per la abelregina ĵeleo. Post korinfarkto (parta formorto de la kormuskolo pro subite ekestinta fluobaro en la respektiva nutranta angio) la doloroj mildiĝas, la subjektivaj malfacilaĵoj, kiel opreso (-tlak) cedas, spirmanko malaltiĝas. Post tromboflebito (vejninflamo) la stato pliboniĝas sekve de la fibrinolizo (solvo-likvido-flueoigo de la filamentforma organika substanco disiganta el la sango kaj ŝtopanta la inflamigintan vejnon). - En la porvirina medicino - la klimakteriaj (preĥodové ; preĥodové) malfacilaĵoj kaj eĉ psiĥozoj mildiĝas. La ĥabituaj (regulaj) abortoj ĉesas. - La ĵeleo havas kontraŭdiabetan efikon, sed la statoj post infekta hepatito (infekční zánět jater; nákazlivý zápal pečene) kaj angino ne reagas sufiĉe bone, des malpli la reumatismo, tuberkulozo kaj malignaj tumoroj - ("Malbonintencaj" svelaĵoj kiel ekz. kanceruoj).

En ĈSSR estas antaŭvidata fabrikado de tablojdoj (tablety), entenontaj abelreginan ĵeleon.

(Laŭ la raporto de Doc.D-ro E.Malý el la medicina fakultato en Koŝice al la medicinistoj en Martin - la 29-an de majo 1963, notis Eliz. Ni aperigas ĉi tiun koncizajn notojn sen garantio, ĉar la ĝisnunajn spertojn rilatas al ankoraŭ relative malgranda nombro da fake kuracataj kaj esplorataj pacientoj).

40 jaroj de Esperanto en Pŝerov. En la nordmoravia - urbo Pŝerov okazis la 18 - 19an de majo renkontiĝo de esperantistoj kaj plenkunsido de ĉeĥoslovaka E-Komitato por soleni la 40-an - datrevenon de la fondo de Esperanto-klubo. Sabate okazis interkona vespero kun estrada prezentado, kiun enkondukis k-do Chytil. Dimanĉe matene komenciĝis la solena kunveno. Malfermis ĝin k-do Vymĉtal. K-do Oprŝal deklamis la poemon de Otakar Bŝezina: Ho, mia patri - n'! K-do Chytil tra legis la leteron de k-do Adolfo Mal - lík, kiu ne povis ĉeesti, pri la historio de Esperanto - movado en Pŝerov. Poste sa - lutiis la reprezentantino - de la Distrikta Nacia Komita - to, sekcio por lernejoj kaj klerigo, kaj gek-do Jermá - ŝ, prezidanto de CSEK el Praha, Koĉvara (Ostrava), Mohapl (Olomouc), Kilián (Tŝebíĉ), Slanina (Praha), Izák (Martin), Liŝka (Ostra - va-Hulváky), Milatová (Tŝi - nec), Pospíŝil (Olomouc), Stadník kaj Řimský, Kostka el Liberec, Bláha (Gottwal - dov), Závodský (Žilina), Sat - tek (Pŝibor), Dryák (Praha) - kaj aliaj. Ambaŭ aranĝoj estis plensukcesaj, tamen ni bedaŭras, ke kaj la sabata prezentado de la talentita, loka estrada grupo estis nacilingva, kaj dum la di - manĉa solenaĵo nur malmul - taj parolantoj uzis la in - ternacian lingvon, ĉar ambaŭ aranĝojn partoprenis ankaŭ franca esperantisto André Giovenal el Lyon.

INTERNACIA RENKONTIĜO EN JIHLAVA

Komence de junio vizitis nian urbon unu franca esperantisto, s-ro France Guerre el ROUEN, kun sia edzino. Kvankam ili loĝis preskaŭ dum ilia tuta libertempo en Jihlava, ili ekkonis helpe de propra aŭtomobilo multe da aliaj belegaj anguloj en nia patrujo. Ekzemple Tábor, Hluboká, Jindřichův Hradec, Macocha, Slavkov, Telč, Žleby, Kutná Hora, Kačina, Sedlec, Liberec, Karlův Týn, Praha.

Samideano Guerre el Rouen prelegis dufoje en nia klubo pri Jugoslavio, Germanio kaj kompreneble pri Francio kaj afable respondis al ĉiuj demandoj de niaj anoj. Sian rakonton li akompanis per eminentaj koloraj diapozitivoj, kiujn li plejparte mem fotografis. Nia renkontiĝo estis bona propagando de Esperanto, precipe verda flage - to sur aŭtomobilo vekis grandan intereson en ĉiuj lokoj, kien ili veturis.

Mi povas diri, ke niaj gastoj estis ĉi tie kontentaj kaj ke ilia ekekurso en Ĉe - hoslovakion bone helpis al ideo de amikeco inter nacioj.

Mirek Lysý

LA ADIAŬA LETERO DE GES-ROJ GUERRE

Al niaj karaj amikoj ĉeĥaj el Jihlava !

Hodiaŭ estas la lasta tago por mia edzino kaj mi en via bona, agrabla, trankvila kaj varma medio en Jihlava, la lasta tago de nia libertempo en via regiono. Mi dankas ĉiujn por afabla akcepto kaj por la sindoneco de fratoj Lysý kaj iliaj familioj. Mi volas danki ankaŭ al ges-roj Šlosárkovi por bona vespero, kiun mi travivis en ilia domo.

Mi ne timas diri, ke via lando estas belega kaj posedas trezorojn de arkitekturo skulptarto, pentroarto ktp., kvankam propra nia lando posedas ankaŭ antikvajn valor - aĵojn.

Do, mi kunportos fortan impreson, kiu instigos min reveni.

Vivu Ĉeĥoslovakio, vivu la frateco, vivu Esperanto!

Ges-roj G u e r r e F., 14, rue Poussin,
R O U E N Seine M-me Francio

ESPERANTO

ILO DE INTERKOMPRENIGO INTER NACIOJ

Antau du semajnoj mi travivis la plej a-grablajn momentojn ek de la komenco de mia esperantigo. Jes, renkontis min granda feliĉo - mi havis okazon, persone konatiĝi kun mia esperanta amiko kaj korespondanto, samideano Andre Cherpilled el Parizo. Kun li mi jam korespondas sufiĉe longe, preskau du jarojn. Verdire, interkonatigis nin fotografajo de la franca aktoro Jean Marais, pri kies bildo mi kuragis peti eĉ delegiton de UEA, samideanon Cherpillod. Li tiam tre volonte plenumigis mian peton kaj post interŝanĝo de kelkaj leteroj ni ekkonis, ke ni povas esti bonaj geamikoj kaj gekorespondantoj. Sed, kiel samideano Andre diras, nia "spirita patro" estas tamen la filmaktoro Jean Marais.

Dum nia korespondado ni eksciis, ke li jam foje vizitis nian landon, okaze de UK de Esperanto en Varsovio. Ni ambau tre bedaŭris, ke ni ne ekkorespondadis pli frue. Precipe mi mem estis tre trista, ĉar dum kvin jaroj de mia korespondado kun fremdlandanoj mi havis eblecon renkontiĝi nek kun unu el ili. Nur nun! Ĉi-jara somero estis de mi tre malpacience atendata. Ja, samideano Andre promesis jam pasintjare al mi, ke li vizitos denove nian respublikon okaze de Universala Kongreso de Esperanto en Sofio. Li sciigis min, ke li alveturos kun sia amiko, samideano Georges, ankau Esperantisto el Parizo. Ilia alveturo al Jihlava estis difinita por la tagmezo de la 24-a de julio. Sed post tuttaga vana atendo, mi ricevis telegramon, sciigantan, ke ili alveturos la 25-an vespere. Kaj la tempo tiel malrapide forpasis! Atendis mi

kun mia patrino kaj iuj Esperantistoj, niaj klubanoj, alvenintaj bonvenigi karajn gastojn el Francujo. Fine malfrue vespere ili alveturis motocikle, kvazau ili estus altirigitaj per nia senpacienca kaj atendo. Mi tute ne povas eldiri, kiel mi sentis min, ekestinte antau mia franca korespondamiko, konatan de mi nur lau fotografajoj, kaj per la leteroj. Sed post kelkaj unuaj frazoj ni jam babilis tiel amike, kiel de longaj konatuloj.

Niaj gastoj ne havis sufiĉe da tempo por resti longe en Jihlava. Jam sabate posttagmeze ili devis forlasi Jihlavon, por ke ili estu ĝustatempe en Sofio, por komenco de 48-a UK de Esperanto.

Al niaj gastoj tre plaĉis en nia respubliko. Kiam ni parolis pri belecoj de diversaj urboj, samideano Andre diris: La plej bela urbo en la mondo estas Parizo, kaj la dua - Via Praha!

Ne volonte niaj gastoj adiauis kun ni. Sed ili promesis, se estos eble, alveturi denove vintre dum Kristnasko.

Semajnon poste alveturis aliaj karaj gastoj, samideano Nils Kindgren el Kalmar en Svedlando kun sia amikino Margaretha. Samideano Nils estas jam longjara bona korespondanto de mia patrino. Ĉi-jare li eluzis okazon, kaj post fino de SAT Kongreso en Hamburgo alveturiĝis kun sia amikino al Jihlava per propra automobilo. Niaj svedaj amikoj havis pli multe da tempo kaj vizitis fame konatajn grotojn de Macocha en Moravia karsto kaj belegan kastelon - Hluboká. Ambau vizititaj lokoj tre plaĉis al ili.

Dimanĉe, per ilia forveturo finiĝis por mi belega tempo de momentoj, travivigitaj kun fremdlandaj Esperantaj geamikoj.

Tiam mi tute ekkonis utilecon kaj bonan ideon de Esperanto. Mi neniam forgesos ĉi-jaran someron, eĉ kiam mi forte esperas, ke tiuj travivaĵoj baldau ripetigos!

Lydie Panská

UYSTAUA ESPERANTO A URESKO JIHLAUA DUM KULTURY ROH 1.-15. IX. 1963. DENNE 9-13 14-18 HOD.

INFANOJ NE KONAS LIMOJN.

Sub tiu ĉi titolo aranĝis anoj de E-rondeto en psikiatra resanigejo en Jihlava okaze Internacia Tago de Infanoj ekspozicieton de infanaj desegnaĵoj el Japanujo, Italujo, Finlando, Vietnamo, Pollando, Nederlando kaj Ĉeĥoslovakujo.

La desegnaĵoj estis plejparte de 7-8 jaraj infanoj kaj granda intereso estis pri Finaj kaj Japanaj desegnaĵoj kaj ankau tre plaĉis la bildetoj de ĉeĥaj cikanaj infanoj.

La interesa ekspozicieto daŭris dum du semajnoj kaj vizitis ĝin multe da vizitantoj grandaj eĉ malgrandaj. Ĝi estis valorata kiel merita laboro.

K-do D-ro Miloš Chyba, por Esperanta referanto de Kleriga Instituto en Praha, transiris en alian sekcion kaj lian lokon okupis k-di-no Škrábková el la II-a sekcio. Ni kore dankas al D-ro Chyba pro lia ĝisnuna efika kunlaboro kaj bonvenigas la novan referantinon.

Rara jubileo. Esperantista pioniro, samideano A.D. Kremer Sarišské Michala - ny S-185, okres Prešov atingis la 85-an vivojaron. Ankau ni aliĝas al la multaj gratulantoj, kiuj salutis nian ĉaran "paĉjon" persone kaj au perletere, dezirante al li pluan sanon.

Ivan D i m o v gvidanto de Esperanto - kursoj, Str. Jor. Zjutibrodski 12, VRACA Bulgario, serĉas gekorespondantojn ĉiulandajn por siaj gekursanoj, diversaj gelernantoj, geinstruistoj, geagronomoj k.a.

Ekspozicio pri Esperanto

Uzina Klubo de Revolucia Sindikata Movado de Oktobra Revolucio, en la moravia urbo Bojkovice aranĝis de la 9-a ĝis la 23-a de junio ekspozicion pri niaj literaturo, korespondado kaj diversaj interesajoj. Okaze de la solena malfermo s. Jan Tichon, delegito de UEA parolis pri la signifo de Esperanto.

SALOMONA VERDIKTO

Jen plej vera historio
el Aŭstrio - Hungario,
la estinta monarĥio
de Habsburga dinastio:

Poŝtisto Ján Krupec inviton ricevis
de Imperiestra Militkomando -
la koro ekstremis, ja preskau eĉ krevis,
glacie tuŝita de Morto - Giganto !...
...Li pene sin trenis al ĉefkuracisto :

"Vi savis min brile de trista pereco -
jen nova minaco por mi ĉekzisto !...
Min savu ankoraŭ el faŭko de l' armeo!"

Ekflugis depeŝo returna, ekspresa:

"JAAN KRUPPEC MALSANIS JE TIF ARDOMENA
LA RESANIGADO JA ESTIS SUKCESA
SED RESTIS POSTSEKVO TRE KONTRAUHIGJENA
LI ESTAS ANKORAU NUN BACILPORTANTO"

Samtage refulmis respond' ultimata
de Imperiestra Militkomando :

"LA REGNON ATENDAS BATALO PLEJ FATA
POSTISTO JAAN KRUPPEC TUJ MOBILIZIGHU
LI KIEL HELPONTO DE ĈEFINTENDANTO
AL ARMEPROVIZO SIN VERVE DEDICHU
KAJ PER LA Funkcio DE BACILPORTANTO
JA KOMISIIGU ALIAN PERSONON
GHIS MORGAU PLENUMU LA STRIKTAN ORDONON"

(El la kolekto "Eskulapo ridetanta" de Eliz,
laŭ la rakonto de D-ro Ĉierny)

La bildo dekstre: Belega statuo, prezentanta Muzon de muziko. Troviĝas en la parko de Smetana en Jihlava. /Fotis D-ro Kubica/

A N E K D O T O

Malgranda knabo sidis ĉe dompordo. Venis sinjoro kaj demandis: "Ĉu via patro estas hejme?" "Jes", respondis la knabo, "li estas hejme". La sinjoro sonoritis, sed neniu venis al la pordo. "Vi diras, ke via patro estas hejme, sed kial neniu venas malfermi?" demandis la sinjoro. "Mi ne scias, ni ne loĝas ĉi-tie", estis trankvila respondo.

Závodný výbor ROH Turčianskych strojární n. p. v Martine vydal v spolupráci s Domom kultury ROH v Jihlave a závodným výborom Grafia v Jihlave učebné texty "Základy mezinárodního jazyka ESPERANTO" pro členov a kurzistov esperantských záujmových krúžkov pri uvedených zariadeniach. Rež. príspevek 10,-Kčs. Expeduje: Esperantský krúžok pri ZV ROH GRAFIA, Srážná 17, JIHLAVA, Jihomoravský kraj.

REDAKCIA ATENTIGO: Por plifaciligigi la laboron de la troŝarĝita presejo, ĉi tiu numero estas multobligita.



Ĉion por la redakcio adresu: ESPERANTO, poŝtfako 80, MARTIN
Stredoslovenský kraj, Ĉeĥoslovakio

Ĉion por la administracio adresu: ESPERANTO-GRUPO GRAFIA,
Srážná 17, JIHLAVA, Jihomoravský kraj, Ĉeĥoslovakio

Presis: GRAFIA Jihlava - Pov. MěstNV-114-Vá-63



Preskaŭ la tutan enhavon de tiu ĉi-ESPERANTO-AGADO maŝinreskribis por fotografado nia vigla kunlaborantino F. Ĉapová. Ŝia kunlaboro estas la plej meritplena, ĉar ŝi havas nur unu brakon. Akceptu nian varmegan dankon, kara s-anino Ĉapová. V-T

K O R E S P O N D I D E Z I R A S :

JANA ŠLAJCHRTOVÁ, 18-jara fraŭlino, PELHŘIMOV 878, Ĉeĥoslovakio

VICTOR CARLOS AFONSO DIAS - B^a La Candelaria, c/. 3^a r^a 43 /La Cuesta/ TENERIFE Islas Canarias - Hispanio

MANUEL LUIS DORTA - B^a La Candelaria, c/. 3^a r^a 43 /La Cuesta/ TENERIFE Islas Canarias - Hispanio

MARIN PARLEV, Str. P. Spras N.7, TETEKEN, Bulgario

Gekursanoj de studenta Esperanta kurso. Skribu al JORDAN KAZAKOV Str. Komsomolska 8, R U S E, Bulgario

REIGL ENDRE, 16-jaraĝa knabo, Str. Kálmány Lajos 6, S Z E G E D, Hungarujo

ZLATKOVIČ NADEŽDA, 13-jaraĝa knabino, Str. Svetozara Markovića 12 b, P A R A C I N, Jugoslavio